Necesas aĉeti novan libro-bretaron ....

Ĉu ***pri, pro***, ***por*** aŭ ***per***?

1. Necesas aĉeti novan libro-bretaron _____ la Esperanto-grupo.
2. Hodiaŭ estos prelego _____ la Esperanta literaturo.
3. Ni iris al la kinejo _____ vidi la filmon.
4. La aŭtomobilo saltetis _____ truoj en la vojo.
5. Ŝi tiris la pezan meblon _____ ambaŭ manoj.
6. Mi aŭskultas la novaĵojn _____ kap-aŭskultiloj.
7. Ni ne povas labori en la ĝardeno hodiaŭ _____ la malbona vetero.
8. Ŝi ĉiam volas rakontadi _____ ĉiu detalo de sia tago.
9. La infano skribis _____ danki sian avinon _____ la bela donaco.
10. *Kiel akvo de l' rivero* estas interesa romano en Esperanto de Raymond Schwartz _____ juna franco, kiu troviĝas en Berlino komence de la 1-a Mondmilito.
11. Antaŭ jarcento oni vojaĝis de Eŭropo al Ameriko _____ŝipo, sed nuntempe oni kutime faras tiun vojaĝon _____ aviadilo.

Necesas aĉeti novan libro-bretaron …. SOLVOJ

1. Necesas aĉeti novan libro-bretaron **por** la Esperanto-grupo.
2. Hodiaŭ estos prelego **pri** la Esperanta literaturo.
3. Ni iris al la kinejo **por** vidi la filmon.
4. La aŭtomobilo saltetis **pro** truoj en la vojo.
5. Ŝi tiris la pezan meblon **per** ambaŭ manoj.
6. Mi aŭskultas la novaĵojn **per** kap-aŭskultiloj.
7. Ni ne povas labori en la ĝardeno hodiaŭ **pro** la malbona vetero.
8. Ŝi ĉiam volas rakontadi **pri** ĉiu detalo de sia tago.
9. La infano skribis **por** danki sian avinon **pro** la bela donaco.
10. *Kiel akvo de l' rivero* estas interesa romano en Esperanto de Raymond Schwartz **pri** juna franco, kiu troviĝas en Berlino komence de la 1-a Mondmilito.
11. Antaŭ jarcento oni vojaĝis de Eŭropo al Ameriko **per** ŝipo, sed nuntempe oni kutime faras tiun vojaĝon **per** aviadilo.